# Informilo

aprilo 2017 – n° 04

Laŭzana Esperanto-Societo

## Lunde, la 3-an de aprilo je la 20-a

kunsido ĉe Espace Dickens en Laŭzano

*La konkurso **TEO KAJ AMO** organizata de Ĉina Radio Internacia kunigas 77 filmetojn el 27 landoj. Nur ene de 13 el ili oni povas aŭdi esperanton. Ni do spektos ilin kaj elektos la plej bonajn.*

**Lunde, la 1-an de majo**

*Diskuto pri "falsaj amikoj" en esperanto (paronimoj)*

**Sabate, la 17-an de junio**

*Ekskurso al muzeoj en Friburgo*

- ***Anekse estas folio pri programo kaj aliĝo***


Somera paŭzo

**Lunde, la 4-an de septembro**

*Decidota*

*Se falas fama homo,*
*li ankaŭ post la falado restas fama.*

Seneko



**La babiladaj rondoj** okazos vendrede je la **19h00**

La gastigonto informas pri sia decido pri la manĝo pere de la komentaro en Doodle. La partoprenantoj aliĝas samloke kaj povas komentaĵe informi ĉiujn – kelkajn togojn antaŭe - pri tio, kion ili alportos.
Kiam ĝi okazas ĉe Espace Dickens, ĉiuj pagas ion por la luado de la salono.

**"Ambaŭa grupo"** : ve, la 24-an de marto, Rosario invitas nin ĉe Espace Dickens. Ve, la 21-an de aprilo estos Monique kaj Giulio siavice.

**"Okcidenta":**

**ve, la 17-an de marto**
ĉe François Randin
ch. de la Vallombreuse 14, Lausanne
021 647 29 28 / 076 411 14 55

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

**"Orienta grupo":**

**ve, la 14-an de aprilo**
ĉe Charlotte Blanc Maillard
av. Nestlé 9, Vevey
021 922 34 74


Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6

**La bazara budo** ĉeestos sur *la place de La Palud* en Laŭzano sa, la 15-an de aprilo, la 6-an kaj la 20-an de majo.
Aliĝu al: http://doodle.com/poll/6hgepagnb58it434


## Laŭzana Esperanto – Societo

ĉe F. Randin – ch. de Valombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 – Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

## La konferenco de ILEI, 30/7 ĝis 7/8 2016.



Tuj post la fermo de la UK en Nitra (Slovakio) ni atingis Nyíregyháza-n, la « betulan[1] urbon » en oriento de Hungario. Sur ĝia blazono tiu arbo simbolas la printempon, la renoviĝon, la kreskon.

La programo estis vere densa : kurso pri hungara lingvo, E-o por komencantoj, paroligaj kursoj, nacia kaj interkona vesperoj, lingvo-festivalo, prelegoj, muziko, koncertoj, ĉendancoj, ktp... nenio mankis, por ke tiu semajno estu sukceso-plena. La temo de la renkontiĝo estis : Novaj vojoj de lernado : interesa programo, ĉu ne? Kun granda plezuro mi sekvis seminariojn por instruistoj. Historio de instruado, kursplanado, ekzercotipoj, psikologiaj aspektoj.

Mi tre aprezis la instrumanieron de la prelegantoj, kiel Zsófia Kóródy, Ilona Koutny, Duncan Ĉarters inter aliaj. Vere nun la instruisto ne plu estas la persono, kiu scias ĉion kaj estas iu supera al la lernantoj, kiuj sekvas la instruon sen diri ion, aŭ nur tre malmulte. Prezentado de E-o centroj, en Herzberg (DE), en Poznan (PL), en Afriko alportis multe da klarigoj. Certe, se mi estus pli juna, mi partoprenus en tiaj aranĝoj kun spertuloj por akiri komentojn, kritikojn, konsilojn ktp... Nenio mankis por ke mi havu pli da sekureco por instrui.

Ili bone klarigis, kiel oni devas instrui nun, ne estas same por infanoj, aŭ plenkreskuloj, aŭ maljunuloj. Oni devas scii, kial ili lernas, kio estas ilia motivado, ĉu ili jam aŭdis pri la lingvo, ktp... Novaj lerniloj kiel Dulingo alportas novan sangon al nia movado.

Kiel en UK ne mankis ekskursoj : grupo malkovris la urbon, la LEGO fabrikon. Kiel ĉie en Hungario, ne mankis termobanejo. En Ŝoŝto oni vizitis la bestoĝardenon kaj subĉielan muzeon. En tiu loko okazis la Lingvo-Festivalo, kie oni malkovris multe da lingvoj. Inter ili la rumanĉan prezentitan de nia SES kunprezidanto Mirejo Grosjean. La tuttaga ekskurso gvidis grandan grupon per buso kaj aŭtomobiloj al Tokaj.

Tiu regiono estas fama, ĉar la reĝo Ludoviko, la 14-a, diris, ke "tiu vino estas la vino de la reĝo kaj la reĝo de la vino". En Mád ni malkovris la belan barokan sinagogon el la 18-a jarcento. Poste en Abaújszántó ni vizitis la memorĉambron en la muzeo kaj ni aŭskultis prelegeton pri la plej fama E-o poeto kaj verkisto Kolomano Kalocsay ; ni portis florojn antaŭ lian statuon. En la vinkelo la urbestro bonvenigis nin kun tipa hungara aperitivo, kiu konsistas el tre forta alkoholaĵo kun pano kaj lardo kun cepoj. En Szerencs ni gustumis ĉokoladon kaj havis eblecon fari nian propran ĉokoladon. Ni bone sukcesis : ĝi estis tre bona. Sur la muro estis bildoj de Nestlé, Peter kaj Cailler. Do ankaŭ ĉi-tie oni konas la historion de nia dolĉaĵo... En Tarcal, en tipa kelo, la vinŝatantoj gustumis vinon. Estis vere tre varma kaj bela tago. Post nia reveno ni spektis filmon pri Tibor Sekelj. Dum la tradicia bankedo ni spertis la hungaran vespermanĝon. Mi pensis, ke la plado sufiĉos por minimume 4-6 personoj sed tute ne, ĝi estis nur por 2. Ĉarma kantistino kaj popolaj dancistoj ravis nin. Estis vere tre agrabla momento, kiel ĉiam en Esperantio. Dum la tuta semajno la suno brilis arde kaj ĉiu el ni sentis sin preskaŭ en ferioj.

Mia unua partopreno en ILEI-evento estis vere interesa malkovro. Mi nur bedaŭris, ke ne pli frue mi konis tiun grupon. Por mi pri tiu semajno restos neforgeseblaj memoraĵoj.

Mi dankas kaj gratulas la LKK-n en Hungario kaj la estraron de ILEI. Certe en la estonteco mi denove partoprenos tiun aranĝon.

Venontjare la 50-a renkontiĝo okazos en Busan (KR), antaŭ la UK en Seulo. Laŭ la prezentado de tiuj eventoj kaj la entuziasmo de niaj Koreaj amikoj, certe okazos mirindaj eventoj. * *Karlota Blanc Maillard*

---

[1] Betulo : le bouleau